Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

STIFTUNG BSW

Numero 4 Oktobro – Decembro 2015

Trafikprojektoj Germana Reunuiĝo

Verkehrsprojekte Deutsche Einheit



Mezura trajnkompleto apud Erfurt (vd. paĝo 9)
(Foto: Mediathek Deutsche Bahn)

Messzug bei Erfurt (s. Seite 9)
(Foto: Mediathek Deutsche Bahn)

Karaj gelegantoj 2
Subteno de regiona grupa vivo 2
La 100-a Universala Kongreso de Esperanto - Taglibro - 4
El terminologia laboro 8
Konstrueja vizito ĉe VDE 8.1 9
GEFA-membrokategorioj ekde 2016 12
GEFA-anoncoj, redakcio 12

Liebe Leserinnen und Leser 2
Unterstützung des regionalen Gruppenlebens 2
Der 100. Esperanto-Weltkongress - Ein Tagebuch - 4
Aus der Terminologiearbeit 8
Ein Baustellenbesuch bei der VDE 8.1 9
GEFA-Mitgliedskategorien ab 2016 12
GEFA-Mitteilungen, Redaktion 12



Karaj gelegantoj,

Festenburg pasis. Kiel ĉiujare GEFA invitis al jarkunveno por ĝui la ofertojn de gastiganta BSW-hotelo, por revidi geamikojn, por interkonatiĝi kun novaj esperantistoj, kiuj partoprenis la enkondukan Esperanto-kurson – kaj kompreneble por praktiki la Internacian Lingvon.

Inter la temoj diskutataj de la funkciuloj estis la demando, kial la jarkunveno de jaro al jaro alparolas malkreskantan nombron de interesuloj.

Ili samopiniis, ke la malkresko de la asocio entute ne estas sufiĉa klarigo, kaj ke de la kalendaro, preter la trafikkonektoj aŭ la programofertoj ĝis la mankanta internacieco estas pripensebla tuta fasko da kaŭzoj.

Por havi certecon necesas enketo inter la membroj.

Se do dum la venontaj semajnoj vi trovos leteron en via paperpoŝtkesto aŭ mesaĝon en via retpoŝtkesto kun demandilo pri ĝuste tiu temo, mi insiste petas vin legi kaj respondi ĝin, eble aldonante proprajn sugestojn, por doni al la organizantoj la okazon adapti la jarkunvenon laŭ viaj deziroj,

Salutas vin
Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

Festenburg ist vorbei. Wie alljährlich hatte die GEFA zur Jahresversammlung eingeladen, um die Angebote des gastgebenden BSW-Hotels zu genießen, um Freunde und Freundinnen wiederzusehen, um mit den neuen Esperantisten bekannt zu werden, die am Esperanto-Einführungskurs teilnahmen – und selbstverständlich um die Internationale Sprache anzuwenden.

Unter den Themen, die von den Funktionären diskutiert wurden, war auch die Frage, warum die Jahresversammlung eine von Jahr zu Jahr abnehmende Anzahl Interessierter anspricht.

Sie waren einer Meinung, dass die Verkleinerung der Vereinigung insgesamt keine ausreichende Erklärung ist, und dass vom Kalender, über die Verkehrsverbindungen oder die Programmangebote bis zur fehlenden Internationalität ein ganzes Bündel von Gründen denkbar ist.

Um Sicherheit zu haben, ist eine Umfrage unter den Mitgliedern erforderlich.

Wenn ihr also in den kommenden Wochen einen Brief in euren Papierbriefkästen oder eine Nachricht in eurem Mailpostfach vorfindet, mit einem Fragebogen über genau dieses Thema, dann bitte ich euch eindringlich, sie zu lesen und vielleicht unter Ergänzung eigener Vorschläge zu beantworten, um den Veranstaltern die Gelegenheit zu geben, das Jahrestreffen auf eure Wünschen auszurichten.

Es grüßt euch
Guido Brandenburg

Subteno de regiona grupa vivo

La aktuala bildo de GEFA estas tiu de grupo konsistanta el unuopaj membroj, kiun unuigas samaj konvinkoj kaj interesoj, kies membroj tamen nur je maloftaj okazoj sin vidas reciproke kaj tial nur sporade havas okazon por aktiva lingvoapliko.

Unterstützung des regionalen Gruppenlebens

Das aktuelle Bild der GEFA ist das einer Gruppe bestehend aus einzelnen Mitgliedern, die die gleichen Überzeugungen und Interessen vereinigen, deren Mitglieder sich jedoch nur bei wenigen Gelegenheiten gegenseitig sehen und deshalb für die Sprachanwendung nur

La faktoj tamen estas aliaj, ĉar majoritate la GEFA-membroj estas organizitaj ankaŭ en almenaŭ unu alia nefaka asocio, kaj tie havas la eblecon vivi la regionan vivon. Per „regiona vivo“ mi celas regulajn renkontiĝojn en malgranda rondo por aŭskulti prelegojn, organizi kursojn aŭ ekskursojn aŭ tutsimple babili.

Konate Germana Esperanto-Asocio (GEA) subvencias aktivan grupan vivon per pago de minimume 10,- € po GEA-membro en tiu grupo (Förderrichtlinien, Abs. 2. Förderung von Ortsgruppen).



Informilo por germanaj esperatistoj
Handzettel für deutsche Esperantisten

Se tiu subvencio ne sufiĉas por kovri la elspezojn - ekzemple por luo de kunvenejo - la grupo bezonas pliajn rimedojn.

Jen estas okazo por montri, ke la fondaĵo Bahn-Sozialwerk povas esti interesita kaj forta partnero:

Vi scias, ke la fondaĵo malfermis sin al ankaŭ nefervojistaj membroj de GEFA. Fondu lokan GEFA-grupon kaj profitigu ĝin de la BSW-subteno! La fondaĵo transprenas ekzemple 50% de la kostoj por luo de renkontiĝejo (BSW-Ril. 6, Abs. 4 Höhe der Wirtschaftsmittel, Satz 4.5).

Apud la aliaj argumentoj rilate al individua profito de BSW-subtenanto kaj la apogo de la fervojfaka laboro, tio certe helpas konvinki la sep esperantistojn el via grupo, fariĝi GEFA-membroj kaj BSW-subtenantoj, kiuj necesas por instali GEFA-grupon.

Pri sugestoj kaj pri aliĝiloj se necese demandu la redakcion (adreso dorsflanke).



Guido Brandenburg

wenig Gelegenheit haben.

Die Fakten sind jedoch anders, weil die GEFA-Mitglieder mehrheitlich in wenigstens einem anderen nicht fachlichen Verband organisiert sind und dort die Möglichkeit haben das regionalen Leben zu leben. Mit „regionalem Leben“ meine ich regelmäßige Treffen in kleiner Runde, um Vorträgen zuzuhören, Kurse oder Ausflüge zu organisieren oder ganz einfach zu plaudern.

Wie bekannt subventioniert der Deutsche Esperanto-Bund (DEB) das aktive Gruppenleben durch Zahlung von wenigstens 10,-€ je DEB-Mitglied in dieser Gruppe (Förderrichtlinien, Abs. 2. Förderung von Ortsgruppen).

Wenn diese Subvention nicht ausreicht, die Ausgaben zu decken – z.B. für die Miete eines Gruppenraums – braucht die Gruppe weitere Mittel.

Hier ist eine Gelegenheit zu zeigen, dass die Stiftung Bahn-Sozialwerk ein interessierter und starker Partner sein kann:

Ihr wisst, dass die Stiftung sich auch den GEFA-Mitgliedern außerhalb der Eisenbahn geöffnet hat. Gründet eine GEFA-Ortsgruppe und lasst sie von der BSW-Unterstützung profitieren! Die Stiftung übernimmt beispielsweise 50% der Kosten für die Miete eines Treffpunkts (BSW-Ril. 6, Abs. 4 Höhe der Wirtschaftsmittel, Satz 4.5).

Neben den anderen Argumenten zum individuellen Vorteil eines BSW-Förderers und der Unterstützung der Eisenbahn-Facharbeit, hilft dies sicherlich die sieben Esperantisten aus eurer Gruppe zu überzeugen, GEFA-Mitglieder und BSW-Förderer zu werden, die erforderlich sind, um eine GEFA-Gruppe einzurichten.

Nach Anregungen und Anmeldeformularen fragt die Redaktion (Adresse auf der Rückseite).

(trad. Brandenburg)

La 100-a Universala Kongreso de Esperanto
- Taglibro -

Der 100. Esperanto-Weltkongress
- Ein Tagebuch -



„Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la granda tutmonda homa familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj, el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas." (L.L. Zamenhof, Bulonjo 1905)

Partoprenantoj de la 100-a Universala Kongreso de Esperanto manifestacias antaŭ la teatro de Bulonjo ĉe maro.
Teilnehmer des 100. Esperanto-Weltkongresses demonstrieren vor dem Theater von Boulogne-sur-Mer.

Sabato, 25.07.2015

Mi forveturis per trajno de Friedberg je 7.38 h, ekde Frankfurt(M) je 8.30 h kaj ekde Bruselo 13.12 h, ŝanĝis en Tournai kaj atingis Lille Flandres ĉirkaŭ 16.30 h. Mi iris al la hotelo, kiu estis en la proksimeco de la du stacioj fervojaj Lille Flandres kaj Lille Europe. Post la elpakado de la valizo mi turnis min al la kongresejo, kiu ne estis en tro longa distanco. Ekde 10.30 h okazis tie la Movada Foiro, kie ĉirkaŭ 120 organizoj, asocioj aŭ kluboj prezentis broŝurojn, librojn, afiŝojn aŭ informis pri ilia agado. Ĝi daŭris ĝis 21.00 h.

Dimanĉo, 26.07.2015

Je la 10.00 h komenciĝis la solena inaŭguro de la UK. Ĝi daŭris ĝis 12.45 h. Posttagmeze mi ĝuis la teatraĵon "Ursula" kaj poste la lingvokurson "la franca ekspresе".

Samstag, 25.07.2015

Ich verließ Friedberg mit dem Zug um 7.38 Uhr, ab Frankfurt(M) um 8.30 Uhr und ab Brüssel 13.12 Uhr, stieg in Tournai um und erreichte Lille Flandres gegen 16.30 Uhr. Ich ging zum Hotel, das in der Nähe der beiden Bahnhöfe Lille Flandres und Lille Europe lag. Nach Auspacken der Tasche wandte ich mich der Kongresshalle zu, die nicht sehr weit entfernt war. Von 10.30 Uhr an fand dort der Markt der Möglichkeiten statt, wo etwa 120 Organisationen, Verbände und Clubs Broschüren, Bücher, Plakate vorstellten oder über ihre Tätigkeit berichteten. Er dauerte bis 21.00 Uhr

Sonntag, 26.07.2015

Um 10.00 Uhr begann die feierliche Eröffnung des Weltkongresses. Sie dauerte bis 12.45

La Nacia Vespero okupis tri salonojn. Francio resp. la francaj gesamideanoj prezentis tre belan kaj varian programon - miksaĵon de kantoj, muziko, ludoj kaj teatraĵoj. Ĝi daŭris ĝis la 22.00 h.

Lundo, 27.07.2015

Matene en la kadro de „Kleriga Lundo“ mi spektis diskuton pri prozo, en kiu samideanino el nia klubo partoprenis. Posttagmeze mi ĉeestis la kunvenon de IFEF. Vespere estis la bankedo en la plej supra etaĝo de la kongresejo. Sekvis la balo en pli suba etaĝo. Sed tie mi nur mallonge ĉeestis kaj nur unufoje dancis.

Mardo, 28.07.2015

Matene mi interesiĝis pri eksterprograma aranĝo, kiun organizis la francaj IFEF-anoj, nome vizito en la ĉefa regejo en la stacio Lille Flandres. Ĝi daŭris ĝis la 12.00 h. Posttagmeze mi partoprenis la kunvenon de la (UEA-) komitato. Vespere okazis la teatraĵo "Feliĉas ĉiuj". Fino estis ĉirkaŭ 22.00 h.



La laborloko de la trajntrafikestro de Lille Flandre
Der Arbeitsplatz des Fahrdienstleiters Lille Flandre

Merkredo, 29.07.2015

Ĝi estis la tago de la tuttagaj ekskursoj . Mi partoprenis en tiu, kiu celis al Bulonjo-ĉe-Maro, kie 1905 okazis la unua UK. Ni aŭtobuse forveturis je la 8.00 h kaj atingis Bulonjon ĉirkaŭ 10.00 h. Ni iris unue en la teatron, kiu tiam servis kiel kongresejo. Ni aŭdis i.a. la prelegon, kiun 1905 faris d-ro Zamenhof. Poste okazis procesio de la amaso tra la urbo kun la urbestro, kun d-ro Zaleski-Zamenhof, la UEA-prezidanto Fettes kaj aliaj. Ni unue marŝis al la stacidomo, ĉe kiu 1905 d-ro Zamenhof (kaj aliaj) estis alvenintaj. Tie ni haltis ĉe la



Surstrataj afiŝoj informis pri la okazanta kongreso. Plakate in den Straßen informierten über den laufenden Kongress.

Uhr. Am Nachmittag genoss ich das Theaterstück „Ursula“ und danach den Sprachkurs „Französisch im Eilverfahren“. Der Nationen-Abend belegte drei Säle. Frankreich bzw. die französischen Esperanto-Freunde stellten ein schönes und abwechslungsreiches Programm vor – einen Mix aus Liedern, Musik, Spielen und Theaterszenen. Er dauerte bis 22.00 Uhr.

Montag, 27.07.2015

Morgens verfolgte ich im Rahmen des „Fortbildungs-Montags“ eine Diskussion über Prosa, an der eine Esperanto-Freundin aus unserem Klub teilnahm. Am Nachmittag war ich bei der Versammlung der IFEF (Internationale Föderation der Eisenbahner-Esperantisten). Abends fand das Bankett im obersten Geschoss der Kongresshalle statt. Es folgte der Ball in einer tieferen Etage. Ich war dort aber nur kurz und habe nur einmal getanzt.

Dienstag, 28.07.2015

Am Morgen interessierte ich mich für eine Veranstaltung außerhalb des Programms, die die französischen IFEF-Mitglieder organisiert hatten, namentlich einen Besuch im Zentralstellwerk des Bahnhofs Lille Flandres. Sie dauerte bis 12.00 Uhr. Am Nachmittag nahm ich an der Versammlung des UEA-Komitees teil. Am Abend wurde das Schauspiel „Alle sind glücklich“ aufgeführt. Ende war gegen 22.00 Uhr.

Mittwoch, 29.07.2015

Dies war der Tag der Ganztagsausflüge. Ich nahm an dem teil, der nach Boulogne-sur-Mer führte, wo 1905 der erste Weltkongress stattfand. Wir starteten um 8.00 Uhr mit dem Bus und erreichten Boulogne gegen 10.00 Uhr. Wir gingen erst in das Theater, das seinerzeit als Kongresshalle diente. Wir hörten u.a. die Rede, die Dr. Zamenhof 1905 gehalten hatte. Im Anschluss führte ein Umzug

monumento de la Majstro, aŭskultis paroladojn de la eminentuloj kaj deprenis poste la tukon de la monumento. Ni daŭrigis la vojon al la urbodomo, kie ni estis akceptataj de la urbestro kaj ties stabo. Oni disdonis ĉampanon, vinon, sukon kaj malgrandajn manĝaĵetojn. Kompreneble okazis paroladoj. Poste la aŭtobuso veturigis nin al restoracio, kie ni sidis ĉe tabloj kun po 10 personoj kaj ricevis abundan tagmanĝon kaj trinkaĵojn. Ni ankoraŭ vizitis la malnovan urbocentron de Bulonjo kaj je la 18.00 h veturis reen al Lille. De la strato ni vidis pro la bela vetero la marbordon de Anglujo, ĉirkaŭ 45 km for.



Kartludo sur la kongreseja scenejo
Ein Kartenspiel auf der Bühne der Kongresshalle

Jaŭdo, 30.07.2015

Matene mi vizitis per metroo (senŝofora) mian francan amikon en la urbeto Croix. Ni manĝis kune kaj poste vizitis la straton "Rue du Docteur Zamenhof", kies iniciatinto li estis. Posttagmeze mi gastis en la „aŭtora duonhoro“ de Mikaelo Bronŝtejn el Rusio kaj aŭskultis la prelegon de la IKU (Internacia Kongresa Universitato) pri "La rezisto de materialoj kaj strukturoj" pezentatan de Hannes Larsson el Finnlando. La vesperon okupis la teatraĵo "Ĉagrenegoj", ĝis ĉirkaŭ 21.00 h.

Vendredo, 31.07.2015

Matene mi ĉeestis la diskuton de la komitato de UEA, posttagmeze la aŭkcion kaj la prezenton de la venontaj kongreslokoj: Nitra en Slovakio kaj Seulo en Suda Koreujo. Vespere okazis la Internacia Arta Vespero, kiu daŭris ĝis ĉ. 22.00 h.

durch die Stadt, mit dem Bürgermeister, mit Dr. Zaleski-Zamenhof, dem UEA-Vorsitzenden Fettes und anderen. Wir zogen erst zum Bahnhof, an dem Dr. Zamenhof (und weitere) angekommen waren. Dort hielten wir am Denkmal des „Majstro“, lauschten den Reden der Eminenzen und enthüllte später das Denkmal. Wir setzten den Weg zum Rathaus fort, wo wir vom Bürgermeister und seinem Stab empfangen wurden. Man verteilte Champagner, Wein und kleine Knabbereien. Auch dort wurden selbstverständlich Reden gehalten. Danach fuhr uns der Bus zu einem Restaurant, wo wir an 10-Personen-Tischen saßen und ein reichhaltiges Mittagessen und Getränke bekamen. Wir besuchten noch das alte Stadtzentrum von Boulogne und fuhren um 18.00 Uhr zurück nach Lille. Wegen des guten Wetters konnten wir von der Straße aus die Küste Englands sehen, fast 45 km entfernt.

Donnerstag, 30.07.2015

Am Morgen besuchte ich mit der (fahrerlosen) Metro meinen französischen Freund in der Kleinstadt Croix. Wir aßen zusammen und besuchten hinterher die Straße „Rue du Docteur Zamenhof", deren Initiator er war. Nachmittags war ich in der „halben Stunde der Autoren“ bei Michael Bronstein aus Russland zu Gast und hörte in der IKU (Internationale Sommer-Universität) die von Hannes Larsson aus Finnland gehaltenen Vorlesung über den „Widerstand von Materialien und Strukturen“. Den Abend nahm das Schauspiel „Riesenärger“ ein, bis etwa 21.00 Uhr.

Freitag, 31.07.2015

Morgens verfolgte ich die Diskussion des UEA-Komitees, am Nachmittag die Auktion und die Vorstellung der kommenden Kongressorte: Nitra in der Slowakei und Seul in Südkorea

Samstag, 01.08.2015

Um 10.00 Uhr begann der feierliche Abschluss des Kongresses. Er setzte sich zusammen aus den traditionellen Elementen wie einer Rede des Vorsitzenden, einer musikalischen Pause und der Übergabe der Fahne an



La UEA-estraro raportas.
Der Vorstand des Esperanto-Weltbunds berichtet.

Sabato, 01.08.2015

Je la 10.00 h komenciĝis la solena fermo de la kongreso. Ĝi estis kompilita el la tradiciaj eroj kiel prelego de la prezidanto, muzika paŭzo kaj transdono de la flago al la venontjara kongresurbo Nitra, kies urbestro ĉeestis.

Poste mi prenis mian valizon el la hotelo kaj forveturis per trajno je 13.46 h, ŝanĝis en Tournai, Bruselo, Kolonjo kaj Frankfurto kaj atingis mian loĝlokon je la 23.40 h.

Sume kaj ĝenerale:

Ĉeestis aŭ aliĝis ĉirkaŭ 2.680 personoj el 82 landoj. Unuafoje ĉeestis du anoj el Orienta Timoro, al kiuj mi havis specialajn rilatojn. La kongresa kuriero "Belfrido" aperis en ses numeroj. Kompreneble mi revidis multajn gekonatulojn kaj geamikojn kaj akiris novajn.

La vetero estis sufiĉe bona, do ne necesis uzi pluvombrelon, kvankam kelkfoje pluvis nokte kaj kiam mi estis ĉe la amiko en Croix. Mi ne estis antaŭmendinta la ofertitan manĝaĵon regulan en proksima universitata manĝejo, sed manĝis en diversaj lokoj, ofte en memserva restoracio, kien iris multaj samideanoj. En la kongresejo mem troviĝis nur kafejo kun trinkaĵoj kaj mangaĵetoj. La libroservon mi kompreneble ankaŭ vizitis kaj aĉetis libron tie. Ne aperis speciala poŝtstampo, sed du Esperanto-poŝtmarkoj laŭ mendo de la UK. Mi estis kontenta pri la aranĝoj kaj la ofertita programo.

Walter Ullmann

die nächstjährige Kongressstadt Nitra, deren Bürgermeister anwesend war. Später holte ich meine Tasche aus dem Hotel und fuhr mit dem Zug um 13.46 Uhr, stieg in Tournai, Brüssel, Köln und Frankfurt um und erreichte meinen Wohnort um 23.40 Uhr.

In Summe und allgemein:

Anwesend oder angemeldet waren etwa 2.680 Personen aus 82 Ländern. Erstmalig dabei waren zwei Mitglieder aus Ost Timor, zu denen ich besondere Beziehungen hatte. Der Kongress-Kurier „Belfrido“ erschien in sechs Nummern. Selbstverständlich habe ich viele Bekannte und Freunde wiedergesehen und neue gewonnen.



Minista kanto el mineja regiono Lille
Ein Bergmannslied aus der Bergbauregion Lille

Das Wetter war recht gut. Es war also nicht notwendig, einen Regenschirm zu benutzen, obwohl es manchmal nachts regnete und als ich bei meinem Freund in Croix war. Ich hatte das angebotene regelmäßige Essen in der nahen Mensa nicht vorbestellt, sondern aß an verschiedenen Orten, häufig in einem Selbstbedienungsrestaurant, wohin viele Gleichgesinnte gingen. In der Kongresshalle befand sich nur ein Café mit Getränken und Häppchen. Den Bücherdienst habe ich selbstverständlich auch besucht und dort ein Buch gekauft. Ein spezieller Poststempel wurde nicht aufgelegt, aber zwei Esperanto-Briefmarken nach Bestellung des Weltkongresses. Ich war zufrieden mit den Veranstaltungen und dem angebotenen Programm.

(trad. Brandenburg)

El terminologia laboro: La vigleckontrolilo

Kvankam la aŭtomata konduko de trajnoj estas teknike regebla kaj sub certaj cirkonstancoj jam praktikata eblo, majoritate la respondecon por la veturanta trajno portas kondukisto sidanta fronte en trakciilo aŭ kondukvagono.



Sifa-pedalo / Sifa-Pedal
(Foto: Wikipedia Sese_ingolstadt)

Ĉar ankaŭ maksimuma kvalifiko kaj rutino ne garantias konstantan agokapablon, la germana reglamento pri konstruado kaj ekspluatado de fervojoj (EBO) postulas enkonstruon de aŭtomato, kiu tion kontrolas.
La „vigleckontrolilo“ (Sifa) laŭ UIC-vortaro estas „instalaĵo en veturilo por kontroli deĵorkapablon de la kondukisto, ekipita per pedalo aŭ regbutono, kiun la trakciilkondukisto je regulaj intertempoj manipulu por konfirmi sian vigle atentan ĉeeston, aŭtomate bremsanta trajnon, se la trakciilkondukisto ne reagas eĉ post avertsono“.
Dum la pedalo estas la dum normala veturo uzata instrumento, la butonon la kondukisto uzas starante apud la fenstro ekz. por observi sian trajnon.
La koncepto de la en Germanio aplikataj instalaĵoj postulas cikle premon de pedalo/butono por daŭro de 30 sekundoj sekvatan de mallonga liberigo.



Aus der Terminologiearbeit: Die Sicherheitsfahrschaltung

Obwohl das automatische Führen von Zügen eine technisch beherrschbare und unter bestimmten Bedingungen bereits angewandte Möglichkeit ist, trägt überwiegend ein Führer die Verantwortung für den fahrenden Zug, der vorn im Triebfahrzeug oder Steuerwagen sitzt.
Weil auch ein Höchstmaß von Qualifikation und Routine keine konstante Handlungsfähigkeit garantiert, schreibt die deutsche Eisenbahn-Bau- und Betriebsordnung (EBO) den Einbau einer Automatik vor, die dieses kontrolliert.
Die „Sicherheitsfahrschaltung“ (Sifa) ist nach UIC-Wörterbuch eine „Einrichtung in einem Fahrzeug zur Überwachung der Diensttauglichkeit des Führers, mit einem Pedal oder Bedienknopf ausgestattet, welche der Triebfahrzeugführer in regelmäßigen Intervallen betätigen soll, um seine aufmerksame Anwesenheit zu bestätigen, und die den Zug selbsttätig bremst, wenn der Triebfahrzeugführer auch nach einem Warnsignal nicht reagiert“ (anderer Wortlaut im Original).



Sifa-avertolampo / Sifa-Warnlampe
(Foto: Wikipedia Tobi_Toaster)

Während das Pedal das bei normaler Fahrt benutzte Instrument ist, nutzt der Führer den Knopf, wenn er am Fenster steht, um beispielsweise seinen Zug zu beobachten.
Das Konzept der in Deutschland eingesetzten Einrichtungen verlangt zyklisch das Drücken von Pedal/Knopf für die Dauer von 30 Sekunden gefolgt von einem kurzen Loslassen.

Guido Brandenburg (trad. Brandenburg)

Konstrueja vizito ĉe VDE 8.1

Ein Baustellenbesuch bei der VDE 8.1



La Viadukto trans lago Froschgrundsee estas 798m longa kaj 65m alta.
Der Viadukt über den Froschgrundsee ist 798m lang und 65m hoch.

Sub la titolo „Trafikprojektoj Germana Reunuiĝo“ (VDE) la germana registaro 1991 decidis vicon da iniciatoj kun la celo, renovigi resp. novkonstrui la de la engermania limo dividitajn kaj neglektitajn orient-okcidentajn trafikkonektojn. Apud sep stratkonstruaj projektoj kaj unu kanalvastiga projekto estis alfrontataj naŭ relvojaj projektoj.

Sep de ili intertempe estas finitaj. La laboroj por la projektoj 8 (Nürnberg – Berlin) kaj 9 (Leipzig – Dresden) ankoraŭ daŭras.

Celo de VDE 8 estas mallongigo de la vojaĝotempo inter München kaj Berlin de origine sep al kvar horoj. Ĝi estu atingata per entute 230 km da novkonstruo kaj 270 km da modernigo de fervojaj linioj

Post la Germana Esperanto-Kongreso en Erfurt nia membro Andreas Diemel povis konvinkiĝi pri la laborprogreso inter Ebensfeld kaj Erfurt de la projektsekcio 8.1. La partoprenintoj de nia jarkunveno en Bad Salzuflen jam havis okazon spekti lian bildraporton.

Unter dem Sammelbegriff „Verkehrsprojekte Deutsche Einheit“ (VDE) beschloss die Bundesregierung 1991 eine Reihe von Initiativen mit dem Ziel, die durch die innerdeutsche Grenze geteilten oder vernachlässigten Ost-West-Verkehrsverbindungen zu erneuern bzw. neue schaffen. Neben sieben Straßenbauprojekten und einem Kanalausbauprojekt wurden neun Schienenwegprojekte in Angriff genommen.

Sieben davon sind mittlerweile abgeschlossen. Die Arbeiten für die Maßnahmen 8 (Nürnberg – Berlin) und 9 (Leipzig – Dresden) dauern noch an.

Das Ziel des VDE 8 ist die Verkürzung der Reisezeit zwischen München und Berlin von ursprünglich sieben auf vier Stunden. Es soll erreicht werden mit insgesamt 230 km Neubau und 270 km Ausbau von Eisenbahnstrecken.

Im Anschluss an den Deutschen Esperanto-Kongress in Erfurt konnte unser Mitglied Andreas Diemel sich vom Baufortschritt zwischen Ebensfeld und Erfurt des Teilprojekts 8.1 überzeugen. Die Teilnehmer unserer



La linio Ebensfeld-Erfurt estas novkonstruita parto de la projekto VDE 8.1 / Die Strecke Ebensfeld-Erfurt ist ein neu gebauter Teil des Projekts VDE 8.1 (Bildo/Bild DB-Mediathek)

La projektsekcio 8.1 longas 107 km da novkonstrua linio, traceita por maksimuma rapido de 300 km/h. La bezonatan fundamentan stabilecon garantiu relmunto en betonslabon. La sekcio konduku tra 22 tuneloj kun entuta longo de 41 km kaj trans 29 valopontojn entute 12 km longajn.

La linio situas ekde Ebensfeld 34 km sur bavara teritorio kaj pasas Coburg oriente. Tamen la urbo apud Niederfühlbach kaj Dörfles-Esbach estas alkroĉita per du konektaj kurbiĝoj.



Sciindaĵoj pri la konstruprojekto estas riceveblaj ankaŭ surloke en la informcentro Goldisthal. / Wissenswertes über das Bauprojekt ist auch vor Ort im Informationszentrum Goldistal zu erfahren.

Venante de la Froschgrund-lago ĉe la bavara/turingia landlimo la novkonstruita linio nordokcidente de Grümpen atingas la funkcibezonan stacion Theuern. La ponton trans la

Jahresversammlung in Bad Salzuflen hatten bereits Gelegenheit, seinen Bildbericht zu sehen.

Das Teilprojekt 8.1 umfasst eine Länge von 107 km Neubaustrecke mit der Trassierung für eine Höchstgeschwindigkeit von 300 km/h. Die notwendige Lagestabilitität soll die Montage der Schienen auf einer „Festen Fahrbahn“ gewährleisten.

Der Abschnitt soll 22 Tunnel mit einer Gesamtlänge von 41 km durchqueren und über 29 Talbrücken mit insgesamt 12 km führen.

Die Strecke verläuft von Ebensfeld 34 Kilometer auf bayerischem Gebiet und passiert Coburg östlich. Die Stadt wird jedoch bei Niederfühlbach und Dörfles-Esbach durch zwei Verbindungskurven angeschlossen.



En fasko da tuneloj kaj pontoj disbranĉiĝas de sudo la konekta linio al Coburg. / In einem Bündel von Tunneln und Brücken zweigt von Süden her die Anschlusslinie nach Coburg ab.

Vom Froschgrundsee an der bayerisch/thüringischen Landesgrenze kommend, erreicht die Neubaustrecke nordwestlich von Grümpen den Betriebsbahnhof Theuern. Der Brücke über das Truckenthaler Wasser folgt der rund 8,3 Kilometer lange Bleßbergtunnel durch den Bleßberg (862 m) unter dem Rennsteig nahe der Pechleite (838,5 Meter).

Der Scheitelpunkt der Strecke liegt bei Goldisthal. Hier folgen immer wieder Tunnel auf Brücken über tiefe Täler. Nördlich der Oelze fällt die Trasse wieder ab. Der rund 7,4 Kilometer lange Silberbergtunnel unterquert Großbreitenbach und das Naturschutzgebiet Oberes Möhrenbachtal. Eine 1.681 Meter lange Brücke überspannt das Tal der Ilm zwi-

Truckenthal-lagon sekvas la ĉ. 8,3 kilometrojn longa Bleßberg-tunelo tra la Bleßberg-monto (862 m) sub la Rennsteig-vojo proksime de la Pechleite-monto (838,5 m).
La kresto de la linio situas apud Goldisthal. Tie ripete tuneloj sekvas pontojn trans profundaj valoj. Norde de la Oelze-rivero la traceo descendas denove. La ĉ. 7,4 km longa Silberberg-tunelo subiras Großbreitenbach kaj la naturprotektejon de supera Möhrenbach-valo. Unu 1.671 metrojn longa ponto transiras la valon de la Ilm-rivero inter Langewiesen kaj Gehren.
Ekde Trassdorf la novkonstruita linio situas



Pilotaj punktoj helpas al la kunstruentreprenoj trovi la laborlokojn. / Lotsenpunkte helfen den Bauunternehmen ihre Arbeitsstellen zu finden.

paralele al la aŭtoŝoseo A71
Okcidente de Molsdorf kaj Möbisburg preter Erfurt-Bischleben la traceo turniĝas en direkton Erfurt. Inter la urbopartoj Bischleben kaj Hochheim la nova traceo alkroĉiĝas al la ekzistanta linio Bebra-Erfurt kaj de okcidente kun du aldonaj trakoj kondukas en la landan ĉefurbon.
Kadre de la projektsekcioj VDE 8.1 kaj 8.2 unuafoje linio de la germana fervojo estas ekipata per la trajnsekuriga sistemo ETCS je nivelo 2 sen signaliloj. La signalilojn anstataŭas la aktualaj indikoj sur la ekrano de la trakciila kondukisto, kiujn la veturila ETCS-ekipaĵo siaflanke derivas el radiosignaloj kaj trakmuntitaj antenoj.



Guido Brandenburg, fotoj Andreas Diemel

schen Langewiesen und Gehren. Von Trassdorf an verläuft die Neubaustrecke über 23 km parallel zur Trasse der Autobahn A71.



Norde de Coburg foje la distanco inter du tuneloj ne estas pli ol 150 m. / Nördlich von Coburg ist der Abstand zwischen zwei Tunneln schon mal nicht mehr als 150 m.

Westlich von Molsdorf und Möbisburg über Erfurt-Bischleben schwenkt die Trasse in Richtung Erfurt. Zwischen den Erfurter Stadtteilen Bischleben und Hochheim schließt die Neubautrasse an die bestehende Bahnstrecke Bebra–Erfurt und führt von Westen mit zwei zusätzlichen Gleisen in die Landeshauptstadt.



La signalo Ne14 anstataŭ ĉefsignalilo markas la komencon de blokadsekcio. / Das Signal Ne14 markiert statt eines Hauptsignals den Beginn eines Blockabschnitts
Foto: DB Mediathek

Im Rahmen der Teilprojekte VDE 8.1 und 8.2 wird erstmalig eine Strecke de Deutschen Bahn mit dem Zugsicherungsssystem ETCS Level 2 ohne Signale ausgestattet. Die Signale ersetzen die aktuellen Anzeigen auf dem Monitor des Triebfahrzeugführers, welche die ETCS-Fahrzeugeinrichtung ihrerseits aus Funksignalen und im Gleis montierten Balisen-Antennen ermittelt.

trad. Brandenburg, Fotos Andreas Diemel

GEFA-membrokategorioj ekde 2016

Kiel anoncite, ekde la 01.01.2016 en GEFA validas la sekvantaj membrokategorioj:

GEFA-Kotizo +BSW-subteno:	**regula membro**
GEFA-Kotizo sen BSW-subteno:	**subtenanto**
sen GEFA-kotizo sen BSW-subteno:	**simpatianto**

Regula membro:
Por regula membro nenio ŝanĝiĝos.
Subtenanto:
Subtenanto restos asocia membro de IFEF, sed ricevos la bultenojn “Fervoja Esperantisto” kaj “Internacia Fervojisto” nur ankoraŭ retpoŝte (se retpoŝta adreso estas konata).
Simpatianto:
Subtenanto ne estos asocia membro de IFEF kaj ricevos la bultenon “Fervoja Esperantisto” nur ankoraŭ retpoŝte (se retpoŝta adreso estas konata)

GEFA-Mitgliedskategorien ab 2016

Wie angekündigt gelten vom 01.01.2016 an die folgenden Mitgliedskategorien:

GEFA-Beitrag +BSW-Förderer:	**Regelmitglied**
GEFA-Beitrag kein BSW-Förderer:	**Unterstützer**
kein GEFA-Beitrag kein BSW-Förderer:	**Sympathisant**

Regelmitglied:
Für ein Regelmitglied wird sich nichts ändern.
Unterstützer:
Ein Unterstützer bleibt Verbandsmitglied der IFEF, bezieht die Blätter „Fervoja Esperantisto“ und „Internacia Fervojisto“ aber nur noch per EMail (soweit eine Mailadresse bekannt ist).
Sympathisant:
Ein Sympathisant wird kein Verbandsmitglied der IFEF sein und bezieht das Blatt „Fervoja Esperantisto“ nur noch per EMail (soweit eine Mailadresse bekannt ist).

Kun bedaŭro ni anoncas la morton de niaj fidelaj membroj:

Astrid Hanke
en aĝo de 79 jaroj

Andreas Biedermann
en aĝo de 67 jaroj

Werner Schulz
en aĝo de 78 jaroj

Mit Bedauern zeigen wir den Tod unserer treuen Mitglieder an:

Astrid Hanke
im Alter von 79 Jahren

Andreas Biedermann
im Alter von 67 Jahren

Werner Schulz
im Alter von 78 Jahren

Redaktofino por FE 01/2016 estos la 15.02.2016	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107
Fakso:	02508-984511
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Donacoj estas bonvenaj sur konto:	
Nomo	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16500905000000953729
BIC:	GENODEF1S12

Redaktionschluss für FE 01/2016 ist 15.02.2016	
Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redaktion:	Guido Brandenburg
Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefon:	02508-9107
Fax:	02508-984511
Email:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Name	Karl Bernhard GEFA
IBAN:	DE16500905000000953729
BIC:	GENODEF1S12